

# Raportas Kubo nur 1 novan kazon kaj neniun forpasinton



Havano, jun 24 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi mardo, oni konfirmis 1 novan kazon pozitivan de Covid-19 por totalo de 2319 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj 102 pacientoj. Aliaj 250 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanatento.

En tiu ĉi tago oni analizis 2006 samplojn, el kiuj 1 estis pozitiva kaj la lando jam akumulas 157 387 studitajn samplojn kaj 2319 pozitivajn.

La nova kazo konfirmita estis kubano. kaj estis kontakto de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 88,4% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum 161 el la kazoj venas el eksterlando. El la totalo konfirmita 54,07% (1254) estas sen simptomaj.

La nova kazo estis viro. El la 2319 pacientoj diagnozitaj, 102 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 85, kun indikilo de morteco je 3,66% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 18 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro da du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 2130 jam rekuperiĝintaj (7 pliaj hieraŭ). Unu paciento estas en kriza stato kaj neniuj en grava stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 9 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 5,2% dum la amerika regiono havas proksimume 50% el ĝiaj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 4 milionoj. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,02%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo, la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la Froilán distancigon por eviti revigligon de la nova kronviruso.

Dume la kuba registaro pritaksas la evoluon kaj preparis strategion por iri al rekuperigo en Havano, sola provinco, kiu restas kun limigoj.

Eldonita de Maritza Gutiérrez González

---

<http://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/226648-raportas-kubo-nur-1-novan-kazon-kaj-neniun-forpasinton>



**Radio Habana Cuba**